MARTO 2012

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2012:2



## Radio

paĝo 6








## Kursoj

por komencantoj okazis en Malmö kaj Stokholmo. Kursgvidantoj estis Roland Lindblom (Stokholmo) kaj Kim J:henriksen (Malmö). Pli da informo vi trovos sur paĝo 8.



## LA ESPERO
**Organ för Svenska Esperantoförbundet**
ISSN 0014–0694
Marto 2012 • 100-a jarkolekto
Fondita en 1913
**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson
**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42
Stockholm, tel. 08–34 08 00. sveda@esperanto.se
**E-post:** laespero@esperanto.se
**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm
**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm
**Tryck:** Pingvinpress
**Prenumeration 2012:** 200 kr.
Prenumerationsavgift för La Espero ingår
i medlemsavgiften.
Plusgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET
**Adress:** Esperanto-Centro, tel. 08–34 08 00
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
**E-post:** sveda@esperanto.se
**Nätsida:** www.esperanto.se
**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!
**Plusgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**Medlemsavgift 2012:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar
under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,
Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.
Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).
**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,
Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET
**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
**Postgiro:** 578–5
**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona
**E-post:** eldona@telia.com **Telefon**: 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN
**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
**Nätsida:** www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se
**Telefon:** 0590-309 09

## ILEI-se

### Manus till La Espero
**sänds till** Bengt Olof Åradsson
Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574
**e-post:** laespero@esperanto.se

| | *Stoppdatum* | *Utkommer senast* |
|---|---|---|
| Nr 1 | 15 januari | 15 februari |
| Nr 2 | 28 februari | 30 mars |
| Nr 3 | 30 april | 31 maj |
| Nr 4 | 15 augusti | 15 september |
| Nr 5-6 | 31 oktober | 30 november |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.



# Bengt Olof Åradsson, nova redaktoro



Kutime la redaktoro prezentas iun personon/esperantiston ĉi-loke. Nun mi kaptas la eblecon iom prezenti min mem, en mia nova rolo kiel redaktoro.

Kelklinie la tiutempa redaktoro iom prezentis min jam 2005 kiam multaj membroj de SEF ekkonis min unua-foje. Tiam mi estis elektita prezidanto de SEF kaj funkciis en tiu rolo dum ses jaroj. Mi havis la bonŝancon renkonti multajn geesperantistojn, plejparte dum la kongresoj.

Nuntempe mi loĝas kaj laboras en Hässleholm kiel ŝtata oficisto pri edukado (Yrkeshögskolan). Espereble mi restos iom pli longe en Hässleholm, eble eĉ ĝis mia pensiuliĝo post kelkaj jaroj.

La pasintaj 10 jaroj estis fakte iom "vario-plenaj": dum tiuj 10 jaroj mi ŝanĝis loĝlokon 8-foje kaj laborlokojn 4-foje, kaj miaj posedaĵoj troviĝas nun en kvar lokoj.

Mi membras en la esperanto-klubo de Helsingborg. Tie mi antaŭ pli ol kvardek jaroj konatiĝis kun Esperanto unua-foje en la tiutempe nova urba biblioteko.

Bengt Olof Åradsson

# REDAKTORAJ VORTOJ

Kompilante mian unuan numeron de La Espero mi volas danki ĉiujn, kiuj iel kontribuis al la realigo de la nuna numero. Sen artikoloj kaj ideoj mi havus grandan problemon.

Samtempe kun mia SEF-prezidanteco mi ankaŭ funkciis kiel redaktoro de Dia Regno, la gazeto de KELI. Ĝi havas proksimume same multajn legantojn. Do teknike mi jam praktikis la "profesion" kaj havas iom da sperto.

SED, mi estas nek aŭtoro nek ĵurnalisto, do mi daŭre ĝojos pri ĉiu kontribuo via-flanke, longa aŭ mallonga, tradukita aŭ memverkita, raporto aŭ teoriaĵo, poemo aŭ fotoj. Simple dirite – per kio ajn vi volas kontribui mi antaŭdankas.

Kion mi do volas en mia redaktora tasko? Laŭ la antaŭa alineo oni facile povas konkludi ke mia baza ideo pri la tasko estas: kolekti, kunmeti kaj orde publikigi la pensojn kaj ideojn de la membraro por reciproka informo kaj inspiro. Teknike mi klopodos prezenti la ricevitajn materialojn en ĝuebla formo.

DO, La Espero estas kaj estos kuna tasko. Tiel ni povas formi la gazeton kiun ni ŝatos legi.

Bengt Olof Åradsson

# Planoj pri la projekto esperanto-info

**Celo**
Intensigi la informadon pri Esperanto en Svedio tiel ke pli da homoj ekscios pri Esperanto, vidos ke ĝi vivas kaj decidos lerni la lingvon.

(Alstrebinda celo povus esti unu promilo, ĉirkaŭ 9 000 homoj, da aktivaj Esperanto-parolantoj kaj unu procento, ĉirkaŭ 900 000, da registritaj subtenantoj en la jaro 2020.)



**Ĉefaj celgrupoj**
- Lingvemuloj scivolemaj
- Vojaĝemuloj malfermitaj
- Justemuloj internaciemaj

**Rimedoj por atingi la celon**

**1. Informpaĝaro moderna**
(Ĉe *www.esperanto-info.org*)

**2. Informiloj simplaj k belaj**
(Afiŝoj, glumarkoj, faldfolioj, retaj reklamiloj ktp)

**3. Informantoj agemaj**
(Reto da informantoj pretaj agi unu fojon monate)

**4. Informtagoj regulaj**
(Regulaj "semo-tagoj", ekzemple komence de ĉiu monato)

Dum la informtagoj la informantoj ekz pendigu afiŝojn, disdonu faldfoliojn, per Facebook informu pri Esperanto.

Bonus ankaŭ fari regulan pritaksadon de la informlaboro. Eblus mezuri kiom da trafoj havas *esperanto-info.org, sv.lernu.net* kaj *esperanto.se* post la "semotagoj" ĉiumonate.

**Kiel funkcius?**
Kiam la paĝaro kaj la informiloj estos pretaj, jen kiel povus funkcii:
- Ĉiuj kiuj volas partopreni en la informado aliĝu al retlisto, ekz. *informantoj-sv.*
  (Por trovi informantojn eblus skribi en La Espero, anonci per retlistoj k.s.)
- Komence de ĉiu monato aperas memorigmesaĝo en la retlisto de la informantoj, ekz.: "Nun estas tempo denove informi pri Esperanto! Provu laŭeble multe informi dum la venonta semajno. Poste volonte skribu mallonge pri via agado al *raportado@esperanto-info.org.* Informiloj kaj pliaj instrukcioj troveblas en *esperanto-info.org/informado.*"
- Tiuj kiuj volas pendigi afiŝojn iras al esperanto-info.org kaj elŝutas afiŝon, elprintas, kopias kaj pendigas afiŝojn en sia regiono (ekzemple en lernejoj, bibliotekoj, universitatoj kaj sur puplikaj anonctabuloj).
- Ankaŭ povas funkcii tiel ke loka klubo aranĝas la elŝutadon, elprintadon kaj kopiadon. Informanto povus preni stokon da afiŝoj dum klubkunveno.
- Tiuj kiuj volas disdoni faldfoliojn faras en simila maniero, do elŝutas de esperanto-info.org, elprintas kaj kopias) kaj poste disdonas en taŭga situacio.
- Tiuj kiuj preferas informi per ekz Facebook povus iri al esperanto-info.org/informiloj kaj preni bildon por poste anonci ĝin en sia Facebook-paĝo. Eblus ankaŭ interkonsenti pri taŭga teksteto anoncinda.
- Fine de la informperiodo iu kompilas mallongan raporton kun statistiko kaj sendas al la listo.
- Bonus iom post iom trovi pli da informantoj por tiel kreskigi la informadon.

**Ĉu kadre de SEF?**
Se pluraj en SEF kaj ĝia estraro ŝatos la projekton estus bone se ĝi iam iĝus parto de SEF.

**Ĉu iam kadre de UEA?**
Se la projekto estus sukcesa en en Svedio eblus poste internacigi ĝin kaj proponi ĝin al UEA.

**Buĝeto**
Momente ne ekzistas mono en la projekto. Eblus starigi monkolektan kampanjon. Mono estos bezonata por pagi al sperta(j) retprogramisto(j), por rethotelo kaj ev por presado de afiŝoj kaj informiloj.

Se vi ŝatus ion komenti aŭ demandi pri la projekto, vi estas tre bonvena skribi al mi. Ankaŭ se vi ŝatus finance subteni la projekton, bonvolu sendi mesaĝon al hokan@ikso.net. Se ni estus multaj kiuj donacus cent aŭ kelkcent kronojn al la projekto, la ŝanco pri sukcesa realiĝo de ĝi estus multe pli granda.

**Hokan Lundberg**

"Ni semas kaj semas,
neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas,
mil semoj perdiĝas, -
Ni semas kaj semas konstante."

El la poemo *La Vojo*
de LL Zamenhof

**Röstregler på SEF årsmöte:**
ur stadgarna

**9.4** Rösträtt för varje medlem:

Varje medlem som erlagt årets medlemsavgift senast 1 månad före årsmötet och som fyllt 16 år före mötet har en röst vid årsmötet.

Ansluten lokal esperantoförening skall redovisa medlemsavgifter till förbundet senast två veckor före årsmötet.

**9.5** Rösträtt för ombud för lokal förening, förutom rösträtten enligt § 9.4:

Varje till förbundet ansluten lokal esperantoförening med minst 5 medlemmar äger rätt till årsmötet sända ett ombud för varje påbörjat 50-tal medlemmar. Medlemsantalet räknas på antalet redovisade medlemsavgifter för föregående år enligt 31.12. En medlem får inte räknas i mer än en förening. Föreningens ombudsfullmakt skall lämnas till förbundets styrelse senast 1 månad före årsmötet. Ombudet ska själv vara röstberättigad, och får inte företräda mer än en röst utöver sin egen.

# Esperantopioniro el Helsingborg

Gustav Henrik BACKMAN, pioniro de la sveda Esperanto movado, estis naskita la 4-an de aprilo 1867 en Ramlösa Brunn apud Helsingborgo kaj mortis la 14-an de julio 1928. Li estis kurac-gimnastikisto en Helsingborgo kaj fondis la unuan klubon de Esperanto en sia hejmurbo, *Helsingborgs Esperanto-Klubb.* Ĝi estis fondita jam antaŭ la fondiĝo de la Sveda Esperanto-Federacio en Stokholmo en decembro 1906. Zamenhof vizitis la membrojn de tiu klubo la 27-an de aŭgusto 1908, kaj ĉi tiu vizito estis lia sola vizito al Svedio.

Speciale en la kriza tempo de la Ido-skismo en 1909 Backman nelacigeble agadis, konstante gvidis kursojn kaj propagandis ĉiumaniere. Li faris propagandan vojaĝon en Germanujo en 1909 kune kun grupo de knabinoj, kiuj senpage studis Esperanton ĉe la geedzoj Backman. Li klopodis eldoni la gazeton *Esperanto-Folket* (Esperanto-Popolo) 1911-1912, aranĝis en 1911 en Helsingborg la unuan landan kongreson ekster la ĉefurbo kaj estis aktiva en la aranĝo de la unua Skandinava Kongreso de Esperanto en Gotenborgo en 1918.

Li verkis kvar lernolibrojn (la unuan en 1892) kaj tradukis *La konscienco riproĉas* de August Strindberg (1928). Post la unua mondmilito aperis liaj vortaroj Esperanto-Sveda (1919, IV + 166 p.) kaj Sveda-Esperanta (1921, [2], 214 p.) La laste menciita restis la gvida tiuspeca ĝis apero de la duoble pli ampleksa de Sam Owen Jansson, Frits Lindén kaj Birger Gerdman en 1934.

Backman estas entombigita en Helsingborgo.

**Nekrolog i Helsingborgs Dagblad, den 15 juli 1928**

I går avled sjukgymnast Gustav Henrik Backman, Ramlösa Brunn, i en ålder av 61 år.

Backman hade länge haft sin verksamhet i Helsingborg som sjukgymnast. Han var mycket intresserad för esperantoidén och hade själv förskaffat sig en djupgående kunskap i detta världsspråk för vars utbredning han var oavlåtligt verksam. I radio har han vecka efter vecka givit en lektion i esperanto i vår, och han hade också utgivit läroböcker på samt översättningar till detta språk.

Han efterlämnar maka, en son samt styvbarn.

Kompilita de **Jill Hilford**





5

KURS I ESPERANTO

börjar

Måndagen den 22. Februari d. å.

Anmälningar mottagas dagligen

hos

*G. H. BACKMAN*
N. Trädgårdsgatan 23.

FÖRFRÅGNINGAR OM
ESPERANTO
och Universala Esperanto-Asocio

besvaras omgående af

*G. H. Backman.*

Ingå i

Helsingborgs Esperanto-Klubb!

Årsafgift: Två (2) kronor.

*Anmälningar härom torde skriftligen sändas till*

*G. H. BACKMAN*
Klubbens Sekreterare.

*Året var 1915.*

11



# Loka kongresa komitato,

kiu energie laboras por sukcesplena kongreso en majo en Helsingborgo.

De maldekstre:
Jill Hilford, Helga Holmgren, Anders Lundberg, Lena Åradsson, Marie Schwabe, Dan Palm, Ann-Louise Åkerlund. Fattas Annika Ahlfors och Peter Bankholm.

Fotis Bengt Olof Åradsson



**Nybörjare, fortsättning, konversation samt barngrupp**, (fr. 5 år). Lärare: bl.a
Carl Mäsak,
Natasha Bertse

**Utöka ditt ordförråd** – vi tar upp miljö och alternativ behandling.
Stella Lindblom,
Martin Strid

**Köksesperanto** – inte köks-franska, detta team förbereder dagens middag (huvudmål).
Anita Dagmarsdotter,
Lennart Svensson

# Årets internationella esperantokurs i Lesjöfors, 8 – 15 juli 2012

Undervisningen gratis. Helpension: vuxen från 2325:- barn 1150:-, stud. från 12 år – gymnasiet 1700:-

Som kursdeltagare kan du bjuda in din familj eller dina kompisar till avslutningsfesten lördagen den 14 juli.

Ni kan även till specialpris, tillbringa tiden före eller efter kursveckan som turister på Esperanto-Gården .

Kontakta oss för mer information:

**Esperanto-Gården**
**680 96 Lesjöfors**
**e-post: egarden@esperanto.se**
**tel: 0590 – 309 09**

# Supeo kaj ĵazkoncerto por ekzamenontoj

**Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado**

La 9an de junio, kiam samtage okazos esperantaj KER-ekzamenoj ĉirkaŭ la mondon, okazos ankaŭ malgranda festo en Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors. Venos la fama ĵazmusikisto Kaj Stridell de Surahammar kun siaj saksofonoj kaj klarneto. Li ankaŭ kantos siajn proprajn esperantoversiojn de kelkaj klasikaj amerikaj ĵazmelodioj.

La koncerto okazos vespere post la ekzameno lige kun supeo, al kiu invitas Esperanto-Gastigejo ne nur la ekzamenintojn sed ankaŭ ĉiujn esperantistojn intersitajn kaj ankaŭ lokajn loĝantojn.

La 9:an de junio okazos nur la skriba parto de la ekzameno. La parolan parton eblas fari dum diversaj internaciaj aranĝoj, ekzemple Universalaj Kongresoj aŭ eŭropaj aranĝoj. Tiuj kiuj sukcesos je la skriba parto en junio ricevos apartan elegantan atestilon de hungara altlernejo pri lingvoj, kiu kontrolas ĉion esperantoekzamenon de la mondo.

Vespere la 8an ekzameniĝontoj povos sin aparte prepari. Tiam Douglas Draper el Oslo avertos pri kelkaj insidaj kaptiloj en kiujn ofte falas tiuj kiuj skribas en Esperanto.

**Ekzameno je tri niveloj**
La niveloj estas baza B1, meza B2, supera C1 laŭ KER (Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj).

Daŭro kaj prezoj de la ekzamenoj estas:
B1 2h/34 EUR,
B2 3h/37 EUR kaj
C1 4h/42 EUR.
(proksimume 3-400 SEK)

La ekzamena rezulto estas pritaksata laŭ sekvaj kriterioj:

*En la skriba parto*
- Lingva korekteco;

*En la skriba sinesprimo*
- verkado laŭ la komunika celo kaj ĝenraj postuloj de la tasko (ekz. letero);
- enhava riĉeco;
- enhava kaj lingva kohereco;
- leksika riĉeco kaj taŭgeco;
- lingva korekteco;
- globala kaj detala kompreno de legita teksto

La ekzamena loko estos Esperanto-Gården, Lesjöfors

Por aliĝi aŭ demandi iru al: http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj. Pri la pago vi povas indiki "Mi pagos surloke". Aŭ vi povos rete skribi al Sef-ker2012@esperanto.se



# Fonder som SEF förvaltar

Fullständigare information om villkor, ansökan, företräden, projektbeskrivning, rapportering etc lämnas av styrelsen.

<u>NEK–fonden</u>
(Nils Erik Kristofersson)

*Syfte*
"att via utdelning av pengar bidra till kunskap om och insikter i språket Esperanto och i världen"

*Användning av pengar*
"Pengar kan användas till att stödja informationsverksamhet och att främja språkundervisningen. Egen lokal skall inte ses som information. Pengar skall inte heller användas av enskilda personer för att delta i kurser, bevista möten etc."

<u>Olle Olssons Minnesfond</u>
Fondens främsta syfte är att genom stipendier och andra bidrag stödja
- dels enskilda esperantister, lärare och andra kulturarbetare inom ramen för vidareutbildning och/eller tillämpning av Esperanto,
- dels esperantogrupper eller -klubbar för genomförande av projekt som i påtaglig grad förväntas främja språkets och/eller esperantokulturens spridning och utveckling.

Stipendier ges därvid i första hand som bidrag till att:
- bestrida kostnader för deltagande i kurser, utbildningsprogram, konferenser, kulturfestivaler och likn. där esperanto är arbets- och umgängesspråk
- leda kurser samt förnya och utveckla kursverksamheten
- och stöd till enskild person för litterär och/eller annan kulturell verksamhet som direkt eller indirekt kan anses främja esperantoidén eller i övrigt bidra till mellanfolklig förståelse och kulturutbyte.

# La virina tago 2012 en Hiroŝima, Japanio

La plenuma komitato de la Internacia Virina Tago 2012 en Hiroŝima ricevis 235 mesaĝojn el 65 landoj kaj teritorioj.

Ni ekspoziciis la mesaĝojn ĉe tri urbaj kunvenejoj en tri semajnoj. La 12an ĝis la 24a de februaro ĉe Placo de urbana interŝango, la 1an ĝis la 9a de marto ĉe Salono de oficejo de kvartalo Naka, kaj la 11an de marto ĉe la kunveno de la Virina tago. Kaj, ekde la 1a ĝis la 8a de aprilo ni ekspozicios ĉe Eduka Centro por Virinoj de la urbo. La 11an, marto, okazis kunveno de la Virina Tago ĉe la Paca Domo, centro de bonfarto de kvartalo Naka, Hirosima, kun 120 aktivaj virinoj inkl. de ne maljunaj kaj viroj.

En la kunsido unue ni silente preĝis por viktimoj de la katastrofo, kaj ni aŭskultis paroladojn de du rifuzintinojn de damaĝitaj lokoj. Poste konata d-ro prelegis pri la radioaktiva efiko al homoj. Prezidis ĝin konata parolistino de NHK, interalie prezentis la Esperanto-Centron kiel unu el la 24 organizoj de la plenuma komitato por la evento post raporto de s-ino Osioka Taeko pri sia laboro.

Ĉiuj ĉeestantoj ricevis 12-paĝan materialon, sur kies 6 paĝoj oni legas la mesaĝojn plejparte informon aŭ kritikon pri atomcentralo en sia lando, solidaran saluton al homoj de Hiroŝimo-Fukuŝimo.

Ni kore dankas pro via kunlaboro!

**OSIOKA Taeko**
Hirosima Esperanto-Centro

# Mazingira – Esperantujo en Tanzanio

Mramba Simba estas nomo konata de pluraj legantoj. Li aperis sur la paĝoj de La Espero plurfoje dum la lastaj ĉirkaŭ dudek jaroj. Li ankaŭ aperis en UK-ojn, kie eble vi renkontis lin.

Mramba loĝas en la regiono Bunda ĉe lago Viktoria. Li estis prezidanto de la landa Esperanto-asocio, kiu post kelkaj malfacilaj jaroj velkis – en lando duoble pli granda ol Svedio kun tute aliaj cirkonstancoj ol ĉe ni, la pruvo kunlabori tutnacie tamen estis laŭdinda.

Poste la politika intereso de Mramba gvidas lian vivon, sed li daŭre vivas kun Esperanto. De malriĉa sengepatra knabo li fariĝis tajloro kaj de 2005 estro de vilaĝaro. Por la periodo 2010–15 li estas elektita estro – kun neniu kontraŭulo en la balotado – de la komunumo de Ketare kun 8000 enloĝantoj.

Plurfoje mi aŭdis lin diri "dank' al Esperanto". Kaj per Esperanto li volas kontribui al la evoluo de sia regiono. Li prezentis plurajn projektojn al esperantistoj tutmonde kaj ĉefe usonaj, francaj kaj britaj amikoj helpis lin realigi liajn ideojn: plibonigi la aĉajn lernejajn konstruaĵojn en 'siaj' lernejoj, aŭ konstrui novajn. Eĉ tutan lernejon, la Esperanto mez-lernejo, kiu ekfunkcios en januaro 2012 por ĉirkaŭ 160 gelernantoj. Jam eksterlanda helpo ebligas studadon por pli ol 400 orfojn, sed ankoraŭ ĉirkaŭ 500 atendas la feliĉon esti helpataj.

Unu liaj aktualaj projektoj estas radiostacio. Mankas ankoraŭ mono por ekipaĵo (stl) al la radiostacio. En regiono kun malmultaj kaj mizeraj vojoj, kun malmultaj veturiloj, la ĉefa komunikilo estas radio. Jam longe troviĝas elsendoj de landaj kaj regionaj programoj, sed Mramba volas plibonigi loke. Tiu projekto logis gastojn al Bunda: la plej prestiĝa Stephen Wasira, ministro pri interrilatoj kaj kunordigado, kiu venis la 4-an de decembro 2011.

Krom tio ankaŭ estas projektoj pri konstruado de profundaj putoj, biogazo, mikrokreditoj por virinoj, plantado de arbaretoj kaj per sunenergio elektrizigi en la domoj de instruistoj, kuracistoj, en lernejoj kaj dispensarioj. Estas pli por rakonti, sed sufiĉas ĉifoje.




Kompreneble estas multaj homoj envolvataj en la laboro, kiu estas farata ene de organizo Mazingira (svahila por 'medio'). Kaj ĝuste medioprotektado estas frua intereso de Mramba.

Se interesas vin, vidu ĉe www.kono.be/mazingira pri antaŭaj jaroj. Lastatempe mankis fortoj por aktualigi la informojn, sed troviĝas skribaj raportoj. Petu kopion de Anita Dagmarsdotter; 070-3299 399 aŭ anidag@telia.com.


La monkolektadon prizorgas pluraj personoj en Eŭropo. Se vi volas kontribui por realigi la radioelsendojn, via kontribuo estas bonvena al la Plusĝirkonto de SEF, 2012-3, kun la informo "Radio".

**Anita Dagmarsdotter**

# Tutmonata kurso en Esperanto-insulo Hajnano en Ĉinio.

Mia amiko Mark Starrs el Chonburi, Tajlando, partoprenis en la tiel nomata BEK-kurso en la universitato de la ĉina insulo Hajnano.

Poste li skribis en retmesaĝo al mi: "Vi demandis al mi pri Esperanto-Insulo. Vere, estis unu en la plej bonegaj spertoj da mia vivo, kaj mi revenis de Hajnano, sopirante al miaj novaj geamikoj tie. Ni lernis en grupoj, kvarope. Mia grupo konsistis el cinaj universitato-studentoj, kaj ni interkonatiĝis tre bone. Mi sentis min kiel junulo. Post 4 semajnoj, la lernantoj povis paroli pli bone ol mi parolis, unu jaro post tiam, kiam mi eklernis E-on. Kaj post ni foriris el Hajnano, kelkaj de miaj kunlernantoj kaj mi parolis skajpe jam du foje. Mi kredas ke ni estos geamikoj tutvive.



Mark Starrs, partopreninto en Hajnano

Fakte, mi revenis al tajlando unu semajno pli frue ol la plejparto de aliaj lernantoj ĉar la kurso estis tro facila por mi. Mi lernis E-on dum du jaroj antaŭ la kurso, sed multe de la aliaj lernantoj neniam lernis ĝin eĉ iomete. Ne gravas, ĉar mi trovis aliajn metodojn praktiki tie, ekzemple, mi povis paroli kun spertaj esperantistoj dum la du hora tagmanĝo kaj vespere. Do, parolante ĝenerale, mi multe profitis."

Fotoj de la kurso vi trovos en www.edukado.net/biblioteko/fotoj

**Ann-Louise Åkerlund**

# Salutojn el Ho Chi Minh Urbo!

Antaŭ ol mia edzo kaj mi forvojaĝis al Vjetnamio mi kontaktis la tiean ĉef-delegiton s-inon LE THI THIEN THU, kun la esperanta nomo Aŭtuna. Ŝi kore invitis nin al kluba renkontiĝo kaj sendis du junajn membrojn por veturigi nin per motorcikloj al la klubejo. Estis nova sperto por ni, sed en Ho Chi Minh Urbo svarmas motorcikloj amase. Ili estas la kutimaj transportiloj kaj por homoj kaj por varoj.

En la klubejo ni interparolis, iom kantis, kaj la prezidanto de Hochiminh Esperanto-Asocio, s-ro TRAN QUAN NGOC, montris bildojn de Strängnäs kaj Stokholmo, kiujn li faris kiam li studis tie kelkajn monatojn en la 70-aj jaroj.

De s-ino Aŭtuna mi ricevis la retpoŝtadreson de esperantisto en Phnom Penh, la ĉefurbo de Kamboĝo, kien ni poste iris. Mi kontaktis lin kaj ni interparolis telefone, sed bedaŭrinde ni ne havis okazon renkontiĝi. Ni tamen vidos unu la alian dum UK en Hanojo.

**Ann-Louise Åkerlund**



RONDO LANGLET

**Rondo Langlet** är ett särskilt sällskap för dem som vill stödja SEF långsiktigt. Inspiration hämtas från Valdemar Langlet som ställde upp för esperanto-rörelsen både i svåra stunder och när den behövde skicklig ledning.

Den som anmäler sig som medlem till Rondo Langlet ger ett löfte om att regelbundet stötta Svenska Esperantoförbundet ekonomiskt.

Kontakta styrelsen för mer information.

## Stokholmo

Flenanoj en semajnfina kurso en EC.

Post trijara paŭzo mi denove gvidis kurson por komencantoj en Esperanto-Centro. Tiu kiu realigis la kurson estis la energia Kaisa Hansen. Ŝi komence de januaro vokis min kaj proponis helpon anranĝi kurson. Mi nur devus aperi antaŭ la lernontoj, ĉion alian Kaisa prizorgos, Bone.

Aliĝis naŭ personoj, sed du ne povis veni pro gripo.

Kvar el la sep aliĝintoj venis el la urbo Flen. Tri semajnojn pli frue telefonis al mi instruisto Lisen Monasterio, kaj ŝi informis min ke ŝi komencis instrui kvar gejunulojn. Tiam mi hazarde menciis ke okazos kurso por komencantoj fine de februaro. Interese! “Mi volas veni kun miaj kursanoj”. Tri el ili akompanis ŝin - du 15-jaraj junulinoj kaj unu 16-jara junulo.

Ili montris grandan intereson, ĉar ili volas daŭrigi studadon kun sia instruisto Lisen M.

**“EspeRolando”**

## Malmö

Post sukcesa varbado okazis kurso kun 15 partoprenantoj en Klubo Esperantista de Malmö en la semajnfino 18-19 de februaro. Kim J :henriksen per sia nur-esperanta instruado kreis bonan etoson kaj post la kurso duono de la kursanoj decidis daŭrigi ĉiun duan sabaton. Dank’ al la kurso ni esperas ricevi kelkajn novajn membrojn.

Plej efika estis anonco en Metro por iom pli ol 4000 kronoj, kiun la plej multaj kursanoj vidis. Iu estis varbita dank’ al la 300 flugfolioj disdonitaj en la urbo.

**Sten Svenonius**

www.agado.net
Sunda Esperanto Agado

## “Språket”

La ĉiusemajna programpunkto pri lingvaj demandoj, antaŭ ne-longe intervjuis konatan anglan lingviston pri ŝanĝiĝoj en la angla lingvo. Iu intervjuisto renkontis John Wells en Londono kaj starigis demandojn.

Por ni esperantistoj la nomo John Wells estas konata, ĉar li estas prezidanto de Akademio de Esperanto, sed tion oni ne menciis en la elsendo.

Du semajnojn poste prof. Andersson citis ian vortliston de Finland-svedaj vortoj, kiun alia Akademiano rekomendis, nome prof. Christer Kiselman.

**“EspeRolando”**

## Esperanto 64:e språket i Google Translate

Sedan slutet av februari erbjuder nättjänsten Google Translate även automatisk översättning till och från Esperanto. Esperanto blir därmed det 64:e språket som stöds. Kvaliteten på översättningen kan förstås diskuteras, men kan ändå anses god med tanke på den betydligt mindre mängden tidigare översatta texter att utgå ifrån jämfört med många andra språk.

**Olof Pettersson**

## 9-a Eŭropa Esperanto Kongreso de EEU – Irlando 2012

La 9-a Kongreso de EEU okazos de la 16-a ĝis la 20-a de julio 2012 en okcidentirlanda urbo Galivo (Gaillimh / Galway). Detalaj informoj kaj la reta aliĝilo estas troveblaj en la kongresa retpaĝo (www.eeu-kongreso.webnode.com). La informfaldfolion en kiu troveblas ankaŭ informoj pri la kotizoj vi povas elŝuti ĉi tie.

Ĉi-foje ni provis ion tute novan. LKK estas personoj el profesia neesperantista teamo de la Galiva entrepreno, kiu havas bonajn kontaktojn ne nur kun la urba administracio, sed ankaŭ kun ĉiuj lokaj instancoj kiuj gravas por la kongreso.

NUNONIA

Konforme al la anticipita anonco, en la ĵusa semajnfino ekfunkciis *Nunonia.*

Nunonia estas nova esperant-lingva novaĵportalo – kun profesieca aspekto kaj enhavo - parte simila al la iama *Ĝangalo*, kaj inkluzivas kaj novaĵojn de la ekstera mondo, kaj tiujn de Esperantujo.

En la sekcio *Artikoloj* estas legebla i.a. interesa artikolo kun Flavio Rebelo...

Vizitu la portalon ĉe: http://nunonia.com

**Szilvási L.**

## Okazos en la klubo de Malmö

Printempa festo. Sabate 14/4 je la 16.00-a horo.

Programo: Borgeby slott (kastelo). Ragnhild Berntsson-Laskowski kun André kaj Alf Mobark rakontos kaj montros novan filmon pri la kastelo.

Menuo: Sandviĉajn tortojn (salikokan kaj rostbefan)

Kosto: 80 kronoj

Aliĝu plej laste la 9-an aprilo al Per-Olov Johansson 040-26 31 94, 0730 30 79 70

**Karin Rylander**
ka.rylander@telia.com